

LI PENTIS KAJ IRIS. IMPOSTISTOJ KAJ PUBLIKULINOJ IRAS ANTAŬ VI KAJ ENIRAS EN LA REGNON DE DIO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la Evangelio laŭ Mateo 21.28-32

En tiu tempo diris Jesuo al la ĉefpastroj kaj al la pliaĝuloj de la popolo: «Mi volus peti vian prijuĝon. Iu viro havis du filojn. Li vokis la unuan kaj diris al li: "Mia filo, iru hodiaŭ labori en la vitejon". Tiu respondis: "Ne, mi ne volas". Sed poste li pentis kaj iris. Tiam li iris al la dua filo, kaj diris la samon. Tiu respondis: "Mi iras, patro". Sed poste li ne iris. Nu, laŭ vi, kiu el la du plenumis la volon de la patro?».

Ili respondis: «La unua».

Tiam Jesuo diris al ili: «Vere Mi diras al vi: impostistoj kaj publikulinoj iras antaŭ vi kaj eniras en la regnon de Dio. Ĉar, kiam Johano la Baptisto venis al vi kaj montris al vi la ĝustan vojon, vi ne kredis je li; sed la impostistoj kaj publikulinoj aŭskultis lin. Sed vi, kvankam vi vidis ĉi tion, eĉ ne pentis kaj ne kredis je li».

La religiaj ĉefoj tre koleras kontraŭ Jesuo, ĉar Jesuo deklaris ke la templo estas kovejo de ŝtelistoj, vokante ilin implicate "banditoj". Do ili sin ĵetas kontraŭ Jesuon kaj petas surbaze de kiu aŭtoritato Jesuo tion faras. Kaj Jesuo ne respondas.

Jesuo diras: "Unue diru vi al mi per kiu aŭtoritato praktikadis Johano la Baptisto. Ĉu de la ĉielo venis lia instruado", tio estas de Dio, "aŭ de la homoj?".

Kaj la aŭtoritatuloj ne respondas. Ili ne respondas ĉar ĉio kio kaŭzas la konduton de la religiaj aŭtoritatoj baziĝas sur ilia ununura Dio, tiu kiu reguligas ilian ekziston, la profito. Ĉio kion ili faras estas por ilia profito.

Kaj surbaze de ilia profito ili rezonas. Se ni diras "de la ĉielo", tiam ili diros "Kaj kial vi ne kredis je li?". Do ili konfesas ke ili ne kredis al la sendito de Dio. Se ni diras "de la tero", la homoj pensas ke Johano estas profeto kaj do ni malgajnas. Do ili ne respondas.

Do al ili Jesuo adresas tiun ĉi parabolon de Mateo ĉap. 21,28-32.

Tio, kion Jesuo diras, do, estas adresata al la plej gravaj religiaj aŭtoritatuloj. *«Mi volus peti vian prijuĝon. Iu viro havis du filojn. Li vokis la unuan kaj diris al li: "Mia filo..."»*

La greka vorto utiligata de la evangeliisto estas plena je tenereco. Ni povus ĝin traduki pli bone per "Fileto mia". Temas pri la sama verbo de kiu venas la vorto "naski", kaj do ĝi estas verbo de granda patrina tenereco. *«Iru hodiaŭ labori en la vitejon»*. La vitejo, estas sciante, estas la bildo de la popolo de Izraelo. *«Tiu respondis: "Ne, mi ne volas". Sed poste li pentis kaj iris»*.

Estas do iu unua filo kiu respondas nee al la invito de la Sinjoro, sed poste pentas. *«Tiam li iris al la dua filo, kaj diris la samon. Tiu respondis: "Mi iras, patro»*. Neniama fidu je tiuj kiuj diras Jes, Sinjoro! Tiu dua ne havas rilaton kun la patro, li ne diris "Jes patro", li diras "Jes Sinjoro". Li estas iu sinjoro al kiu obei.

«Sed poste li ne iris». En la vortoj de Jesuo estas la eĥo de la denonco de profeto Jesaja reprenata de Jesuo mem: "Tiu popolo min honoras per la lipoj, sed ĝia koro estas malproksima de mi". "Jes, Sinjoro", sed ili havas neniun intencon kunlabori en la agado de tiu sinjoro al kiu ili sin adresas tiom respekteme. Kaj Jesuo diris: "Ne tiu kiu diras al mi Sinjoro, Sinjoro..." Tiu personoj do oni jam scias ke ili estas forigitaj de la realo de Dio.

Kaj Jesuo demandas do al la religiaj aŭtoritatuloj, *«Nu, laŭ vi, kiu el la du plenumis la volon de la patro?»*. Jen aperas la vorto "Patro". Estus estinte pli bone ke ankaŭ ĉifoje ili silentus, ne respondus. Male ili respondas: *"Ili respondis: „La unua."*

"Tiam Jesuo diris al ili: «Vere...». Do temas pri solena, grava, aserto, *«Mi diras al vi...»*. Kaj Jesuo kontraŭmetas al la maljunaj ĉefpastroj, la unuaj en la socio, la intimuloj de Dio, impostistoj kaj publikulinoj, la lastaj en la socio, la forigitoj de Dio.

«Impostistoj kaj publikulinoj iras antaŭ vi». La konstruo de la greka verbo, tradukita per "iras antaŭ" ne montras la antaŭecon, tio estas ili iras antaŭe kaj poste venas vi, sed ĝi indikas ekskludon, tio estas ili prenis vian lokon.

Tiuj kiuj vi opinias esti la respondeculoj de la malfruo de la Dia regno, jam estas tie kaj vi restis ekstere. Kaj Jesuo konkludas: *«Johano»*, jen revenas la temo de la Baptisto, *«venis al vi kaj montris al vi la ĝustan vojon, vi ne kredis je li»*.

Neniama la religiaj aŭtoritatuloj kredos je iu sendito de Dio. Neniama! Ili estas tute rezistaj al diaj anoncoj. Ili estas tute surdaj al la vorto de la Sinjoro.

«*La impostistoj kaj la publikulinoj*», tio estas la kategoroj konsiderataj de Dio tiuj al kiuj oni kredis ŝuldi la malfruon de la regno, “kontraŭe aŭskultis lin”.

«*Sed vi, kvankam vi vidis ĉi tion, eĉ ne pentis kaj ne kredis je li*». Jen tri fojojn en la evangelio de Mateo aperas la verbo “pentis”. Ĉi tie en la parabolo de la filo kiu pentas, en la kazo de Judaso la perfidulo kiu pentas, sed la aŭtoritatuloj ne. La aŭtoritatuloj neniam pentos. Pentis Judaso, sed la aŭtoritatuloj neniam pentos, ĉar tio kio gvidas ilian konduton estas la profito, la ununura Dio en kiu ili kredas.

Ili havas neniun alian diaĵon al kiu referenci. La evangeliisto komprenigas al ni ke la religiaj aŭtoritatuloj estas tute rezistaj al la bona novaĵo de Jesuo, ĉar ili devus perdi sian povon, siajn privilegiojn kaj sian prestiĝon. Kaj la bona novaĵo de Jesuo estas invito esti amesprimo kiu iĝas servo por la homoj.